

# Usona Esperantisto

Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2011:4 (jul-aŭg)

# American Esperantist

Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2011:4 (Jul-Aug)



Ana VELITCHKOVA

## Ĉi-numere:

- Novaj estraranoj
- Saluto de la nova prezidanto
- Nova rubriko:  
*du jaroj kamerune*
- Kaj multe pli!

## NASK 2011: nun pli densa kaj intensa (pĝ. 9)

Supre: Vicky CRICKETT, Kinen CARVALA kaj Thomas RUSCH esploras la marbordon de La Jolla.

## Usona **Esperantisto**

**Dumonata bulteno • Bi-monthly bulletin**

Vol 50, No 4 — 2011:4 (jul–aŭg)

Redaktisto • Editor: HOSS FIROOZNIJA

Sendu kontribuojn al • Send contributions to:

✉ bulteno@esperanto-usa.org

✉ Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia  
CPU 271205, U. of Rochester  
Rochester, NY 14627-1205, USA

*Usona Esperantisto (American Esperantist) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.*

*You may reprint content from this publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to the address above. Opinions expressed here are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of Esperanto-USA or the editor.*



*Usona Esperantisto* estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Prefere uzu retroŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Kun aliaj fotoj bonvolu aldoni noton pri la dato, loko, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn de la bulteno kun fontindiko. Bonvolu sendi ekzemplerojn de ajna publikigita materialo al la supra adreso. Opinioj esprimataj ĉi tie apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de Esperanto-USA aŭ la redaktisto.



**Centra Oficejo • Central Office**

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA

☎ 510.653.0998; 2510.653.1468

✉ info@esperanto-usa.org

http://esperanto-usa.org

**Direktoro • Direktoro, CO:** William B. HARRIS

**Prezidanto • President:** Orlando E. RAOLA

**Vicprezidanto • Vice President:** Philip G. DORCAS

**Sekretario • Secretary:** Steve BREWER

**Kasisto • Treasurer:** Christopher ZERVIC

**Aliaj estraranoj • Other board members:** George

BAKER, Neil BLONSTEIN, Steven CYBULSKI, D. Gary GRADY, Tor KINLOK, Julie SPICKLER, Ĝan STARLING, Julie WINBERG, Christine WINGROVE.

## Novaj estraranoj!

Laŭ rezultoj de la voĉdonado ĉe la Landa Kongreso, jen la novaj estraranoj (kiuj servos ĝis la menciita jaro):

- Prezidanto: Orlando RAOLA, 2014
- Vic-prezidanto: Phil DORCAS, 2014
- Estrarano: Christine WINGROVE, 2014
- Estrarano: Steven CYBULSKI, 2014
- Estrarano: D. Gary GRADY, 2014
- Estrarano: Neil BLONSTEIN, 2012

Neil plenumos la vakan lokon de Orlando, kiu havis deĵorperiodon ĝis 2012 kiel estrarano.

## LK 2012 en Dalaso



Metu la datojn en viajn kalendarojn nun! La 60-a Landa Kongreso de Esperanto-USA okazos ĉe la Universitato de Teksaso ĉe Dalaso (UTD) de la 22-a ĝis la 25-a de Junio, 2012. Venu!



## Forpaso: Harold R. DREYER

Harold R. “Hal” DREYER mortis je la 19-a de Aŭgusto en El Cerrito, Kalifornio pro limfomo. Hal estis longtempa kaj tre fidela membro de E-USA, SFERO kaj UEA, kaj antaŭe membro de IEL kaj EANA. Li lernis Esperanton en 1948 opiniante ke la mondo bezonas pontlingvon por kreskigi pacon. Hal naskiĝis la 25-an de Majo 1920 en Berkeley, Kalifornio kaj estis profesie komercisto. Lin postvivis la vidvino Roberta DREYER. Kondolencoj povas esti senditaj al ŝi ĉe 1212 Rivera St., El Cerrito CA 94530.

*Raportas Wm. R. HARMON, Ĉefdelegito de UEA, Usono.*

**We need you!** Your membership fees help promote Esperanto and provide services to speakers and students across the country. Members receive the bi-monthly magazine *Usona Esperantisto*, the *Membership List*, discounts from the Book Service, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and a discount at the national convention. Please join (or renew) today!

Return with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: \_\_\_\_\_

Address: \_\_\_\_\_

City & State: \_\_\_\_\_

Postal code & Country: \_\_\_\_\_

Phone: \_\_\_\_\_ E-mail: \_\_\_\_\_

Birthdate (MM/DD/YY): \_\_\_\_/\_\_\_\_/\_\_\_\_

In the member list, don't publish my:  postal address  phone  email address

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Please check **one** category of membership/support:

Friend of Esperanto ..... \$10.00

*(not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter)*

Youth *(you must be under 27)* ..... \$20.00

Limited Income ..... \$20.00

Individual ..... \$40.00

Family ..... \$60.00

Sustaining ..... \$80.00

Life *(birthdate required)* ..... \$800.00

I would like to receive the magazine, *Usona Esperantisto*, in:

Paper form only  Electronic (PDF) form only *(email address required)*  Both

Credit card info:  Visa  Mastercard

Number: \_\_\_\_\_ Expires(M/Y): \_\_\_\_/\_\_\_\_

Card verification #: \_\_\_\_\_ *(three digits on back of card, or on front for AmEx)*

## Regional events

For a comprehensive list of upcoming events worldwide, see <<http://eventoj.hu>>.

### Sep. 16 – 18 (Guadalajara)

#### **Meksika Esperanto-Kongreso**

The 11th Mexican Esperanto Convention takes place this year in Guadalajara, the capital of Jalisco. For program details, see <<http://esperanto-mexico.org>>



### October 8 – 10 (Silver Bay, NY)

#### **Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (Fall Esperanto Gathering)**

Come join us on the shores of beautiful Lake George in the Adirondacks for ARE, the 18th annual Fall Esperanto Weekend. Organized by the Esperanto-Society of Québec, the event typically draws 50–80 people from Quebec, Ontario, the northeastern US, as well as the UK, Germany, Switzerland, even Japan! Courses, talks, games, hikes in the mountains, and much more. For more info: <<http://esperanto.qc.ca/en/are>> or contact <[informo@esperanto.qc.ca](mailto:informo@esperanto.qc.ca)>.



### November 19 – 20 (Harrisburg, PA)

#### **Urba semajnfino**

#### **(Esperanto City Weekend)**

Organized by Wikipedia-founder Chuck SMITH, the Esperanto City Weekend returns to Harrisburg for 2011. Activities include trips to Indian and Thai restaurants, a tour of Hershey's Chocolate World, and a visit to the National Civil War Museum. For more information and a sign-up form, see <<http://is.gd/harrisburg2011>>.

## Local groups

Below are contact addresses for some of the larger local groups that meet regularly. Please send any updates to <[bulteno@esperanto-usa.org](mailto:bulteno@esperanto-usa.org)>.

### California

**Sacramento:** <http://esperanto.org/us/esos>

**San Diego:** <http://groups.yahoo.com/group/EsperantoGrupodeSanDiego>

**San Francisco:**  
<http://esperanto.org/us/SFERO>

**Santa Barbara:** [dorothyjeanh@gmail.com](mailto:dorothyjeanh@gmail.com)

**Colorado** (Longmont) <http://ek-ek.org>

**Connecticut** (Wallingford) <http://esne.net>

**District of Columbia** <http://esperantodc.org>

**Georgia** (Atlanta) <http://esperanto-atlanta.org>

**Hawaii** (Honolulu)  
<http://esperanto.org/us/Honolulu>

**Idaho** (Boise) <http://terpomuloj.org>

### Illinois

**Champaign-Urbana:** <http://ekoci.org>

**Chicago:** <http://esperanto-chicago.org>

**Maine** (Bangor, Houlton) <http://esne.net>

**Massachusetts** (Acton, Amherst, Cambridge, Northampton) <http://esne.net>

**Missouri** (St. Louis) <http://esperanto-stl.org>

**New Jersey** (Princeton)  
<http://esperanto-nj.tripod.com>

### New York

**New York:** <http://esperanto-nyc.org>

**Rochester:** <http://esperanto.lodestone.org>

**North Carolina** (Raleigh Durham)  
<[charles.o.mays@gmail.com](mailto:charles.o.mays@gmail.com)>

### Texas

**Austin:** <http://esperantaklubo.konfuzo.net>

**Dallas:** <http://esperanto-tx.org>

**Virginia** (Hampton Roads) <http://bonege.com>

**Washington** (Seattle)  
<http://seattlesperanto.org>

**Wisconsin** (Madison)  
<http://groups.google.com/group/esperanto-societo-madison>

## Saluto de la prezidanto

Estimataj asocioj kaj amikoj:

Estas plezure kaj honorige adresi vin sur la paĝoj de *Usona Esperantisto* unuafoje post mia elekto kiel prezidanto de nia landa asocio. Mi dankas vian fidon kaj ĝin reciproke per promeso labori diligente kaj senlace por ke la Esperantomovado en Usono estu ĉiam pli vigla, pri altkvalita kaj pli internacia.

Dum la elektokampanjo, mi havis la ŝancon detale klarigi miajn konkretajn planojn por asocia gvidado. Mi ne revertumos ilin ĉi tie, vi ankoraŭ povas legi ilin ĉe nia retejo. Mi volas nur resume diri, ke temas precipe pri:

- arigi ĉies fortojn, provizi al ĉiuj kiuj emas kunlabori spacon por ties kunlaboro;
- kunigi la dankindan sperton de niaj veteranoj kun la natura entuziasmo de niaj pli junaj membroj;
- daŭre certigi, ke ĉiuj kiuj interesiĝas pri Esperanto havas la ŝancon ellerni ĝin kaj avantaĝe uzi ĝin por ajna komunika bezono, speciale pri komunikado internacia/interkultura;
- fari ĉion ĉi uzante plej efektive malnovajn kaj novajn komunikrimedojn.

Konsentite, ke temas pri sufiĉe ambiciaj planoj: ne ĉiuj apartaj eroj estos plenumblaj dum mia deĵorperiodo, ne ĉiun opan planeron apogos absoluta plimulto de la asocioj. Tamen, mi kontentas pri tio, ke almenaŭ ni havas klaran kaj detalan ideon pri la direkto de nia agado kaj



**Orlando E. RAOLA**

estas la nova prezidanto de Esperanto-USA, elektita en Junio ĉe la Landa Kongreso en Sanfrancisko. Li loĝas en Greenbrae, Kalifornio.

[oraola@gmail.com](mailto:oraola@gmail.com)

pri niaj prioritatoj. Helpe de ili, ni povos facile konstati, ĉu ni progresas aŭ stagnas en niaj klopodoj.

Sukceso en la proponita taskaro ankaŭ ebligos plenumi revon: inviti la Universalan Kongreson de Esperanto por ke ĝi okazu en nia lando en la jaro 2015, ekzakte cent jarojn post la 11-a UK, okazinta en San-Francisko, kune kun la Panamo-Pacifika Internacia Foiro de 1915. Pluraj aktivuloj jam esprimis preferon pri eblaj kongres-urboj: Orlando, Florido kaj Bostono, Masaĉuseco ĝis nun montriĝas plej allogaj kandidatoj. Je la fino de tiu ĉi jaro, kaj okaze de la Zamenhofa Tago, ni lanĉos la Esplorkomitaton pri UK-2015. Se vi havas interesan proponon aŭ preteco engaĝiĝi en la multflanka laboro bezonata por efektivigi tiun ĉi projekton, bonvolu vin anonci antaŭ la limdato.

En la venonta numero de *Usona Esperantisto* ni planas ankaŭ komenci gravan diskuton pri la estonteco de tiu ĉi plej grava asocia komunikilo mem. Hurlas ĉe ni multegaj demandoj: ĉu UE transiru ĉefe al surreta formo, kun eventuala produktado de papera versio por tiuj kiuj ne povas/volas legi ĝin sur la reto? Ĉu ĝi estu senpage havebla rete? Kiom da membroj kredas, ke la ricevado de nia dumonata papera bulteno estas grava (eĉ

(Daŭrigo en pĝ. 6)

### Pri eldonado elektronika

Pro rapida dismultiĝo de larĝkapacitaj retkonektoj, jam de jardeko eldonistoj esploras diversajn metodojn por eldoni gazetojn elektronike. Ne surprize, multaj iliaj provoj fiaskis – kaj daŭre fiaskas – pro almenaŭ du malfacilaj obstakloj.

La plej obstina, sendube, estas la problemo pri kiel gardi aŭtorrajtojn en cifereca mondo. Tehnikoj por cifereca administrado de aŭtorrajtoj (angle “DRM” aŭ *Digital Rights Management*) restas malelegante pezaj, kaj daŭre malfaciligas vivon por konsumantoj de diversspecaj elektronikaj verkoj. Feliĉe, en Esperantujo la DRM-problemo ankoraŭ ne tiom plagas nin kiom en pluraj nacilingvaj merkatoj. (Ĉu eble pro tio, ke eldonado en Esperantujo ankoraŭ ne estas aparte profitdona?)

La alia defio – kiu aparte koncernas eldonistojn de gazetoj – estas elekto de la plej konvena kaj uzebla cifereca dosierformato. Ekzemple, formato tute konvena por romano ne nepre konvenas por gazeto. En romano, plej ofte troviĝas linia sinsekvo de tekstaj ĉapitroj kiuj kondukas leganton de komenco al fino. (Krom eble en kelkaj eksterordinaraj kazoj, ekzemple la serio de lud-romanoj *Choose Your Own Adventure*®, kiuj furoris en mia junaĝo...)



### Hoss FIROOZNIA

Hoss redaktas tiun ĉi gazeton ses fojojn jare. Intertempe, li studas tradukarton en Roĉestro, NY kaj luktas kun malbonkondutaj komputiloj.

[hoss@lodestone.org](mailto:hoss@lodestone.org)

En gazetoj, kontraste, redaktistoj komunikas diverstemajn artikolojn kiujn oni elektas legi (aŭ ignori) laŭplaĉe. Foje tiuj artikoloj estas grafike riĉaj, do gravas ne nur la teksto mem, sed ankaŭ la kompostado, tipografio, aranĝo de fotoj kaj desegnaĵoj, ktp.

Bedaŭrinde, pluraj el la plej popularaj dosierformatoj ne facile konservas ĉiujn tiujn erojn. En la fruaj tagoj de la Tut-Tera Teksaĵo, oni esperis ke HTML – la dosierformato de retpaĝoj – konvenus por ĉiuj specoj de presitaj verkoj. Tamen HTML estas esence “flua” formato, kreita por aŭtomate adapti sin al ekranoj diversgrandaj; tiu trajto bone konvenas al retpaĝoj, sed ne tiel bone al presitaj verkoj. Rezulte estas ofte malfacile, aŭ eĉ vane, provi imiti presitan formaton en HTML.

Post jaroj da esploro, evidentiĝis ke HTML plej bone okupas nur unu niĉon en la eldona ekologio. Kvankam retpaĝoj estas preskaŭ idealaj por mallongaj tekstoj kaj supraĵa legado (konvene al blogoj,

### de la prezidanto (daŭrigo de pĝ. 5)

ĉefa) kialo por aliĝo al la asocio? Bonvolu pripensi respondojn kaj estu preta esprimi viajn opiniojn skribe, jen rekte al la redaktoro, jen kiel kontribuaĵoj en nia blorgejo.

Fine, mi bondeziras al ĉiuj legantoj kaj denove certigas, ke ni restos ĉiam aŭskultemaj kaj pretaj por konstruiva interŝanĝo, plenaj je nevenkebla optimismo sed ankaŭ plene starantaj sur la grava fundamento de l’ realo. ★



ekzemple) ili ne tiel bone konvenas por longaj artikoloj, detala legado, kaj grafike riĉaj tekstoj.

Eble tial, en lastaj jaroj multaj eldonistoj de la Esperanto-gazetaro pli kaj pli decidigas pri la grafike riĉa, prespreta formato PDF (angle *Portable Document Format*). Kvankam ĝi ne estas la plej nova aŭ moda formato, ĝi funkcias tre bone. Popularaj gazetoj kiel *La Ondo*, *Esperanto*, *Monato*, *Kontakto*, kaj aliaj nun haveblas PDF-e.

Ĝis lasta tempo, tamen, eĉ PDF restis maleleganta solvo, ĉar ankoraŭ necesis sidi antaŭ komputila ekrano por legi ĝin. Tiun lastan problemon finfine solvis la ekapero de komputiletoj kreitaj specife por imiti paperajn librojn. En Esperantujo, oni komencas nomi tiajn ilojn *poŝlegiloj* aŭ *legoplatoj*.

Haveblas nun tre bunta grego de legoplatoj diversmarkaj, inkluzive de *Kindle* (*Amazon*), *Reader* (*Sony*), *iPad* (*Apple*), *Nook* (*Barnes & Noble*), kaj aliaj. Ĉiu legoplatato povas enteni milojn da libroj kaj gazetoj en diversaj formatoj – ĉu aŭtorrajte ŝlositaj aŭ ne. Proksimume same malgrandaj kaj malpezaj kiel siaj paperaj kuzoj, legoplatatoj ebligas komfortan legadon preskaŭ ie ajn. Kaj plej grave por redaktistaj celoj, multaj bone subtenas PDF-formaton, tiel ke elektronikaj gazetoj povas prezenti la

saman riĉan kompostadon de la presitaj versioj.

La teĥnologio estas ankoraŭ nova, do kompreneble restas pluraj mankoj. Tamen aferoj evoluas surprize rapide. Jam en pluraj PDF-legiloj eblas enskribi notojn, marki kaj kopii tekston, kaj eĉ lasi legosignojn per “falditaj” paĝanguloj.

Malmultaj legantoj scias, ke jam de pluraj jaroj ankaŭ *Usona Esperantisto* disponeblas en PDF-formato. Ĝis nun ni ne multe reklamis la servon, ĉar niaj rimedoj por disdonado kaj arĥivado restis tro kapricaj kaj nekonsekvencaj.

Tio baldaŭ ŝanĝiĝos. En la venontaj monatoj ni starigos retan eldonejon kie membroj rajtos elŭsti la plej novajn numerojn de *Usona Esperantisto*. Tuj kiam freŝa papera versio presigas, membroj retroŝte ricevos atentigan mesaĝon kun la adreso de rete elŭtebla PDF-dosiero. Ni ankaŭ efektigos eblon por tiuj, kiuj volas aboni la gazeton *nur* elektronike.

Restas farendaj pluraj burokrataj taskoj, sed ni nun komencas krei liston de tiuj, kiuj volas ricevi la elektronikan version de la gazeto. Mesaĝu al la adreso [bulteno@esperanto-usa.org](mailto:bulteno@esperanto-usa.org) por esti en la avangardo! Bonvolu mencii ĉu vi volas ricevi la elektronikan version aldone al la papera, aŭ ĉu anstataŭe. ★



Eĉ nun haveblas PDF-versioj de *Usona Esperantisto* en kiuj eblas marki tekston, enskribi notojn, kaj pli. Jen ekzemplo de iPad uzanta aplikajon *GoodReader*.

## La stereo-metodo de kreta pentrado

Por percepti reliefon, la homa cerbo utiligas du ĉefajn meĥanismojn. Unu uzas la fenomenon de *paralakso* – subtilajn diferencojn inter la bildoj kiuj venas de ĉiu okulo – por rekrei tri-dimensian figuron el la nur du-dimensiaj bildoj. Tia rekreado estas komplika geometria tasko. Alia meĥanismo, nomita *unuokula stereoskopio* analizas perspektivajn aludojn en la bildoj – ekzemple, kiel konvergĝas paralelaj linioj. Tiu dua meĥanismo sufiĉas por vidi reliefon eĉ sen ajna paralaksa informo.

Kiam oni vizitas muzeon kaj rigardas majstroverkon pentritan per fortaj perspektivaj aludoj, por plej bone percepti reliefon fakte necesas fermi unu okulon! Kial? Ĉar kiam oni rigardas per ambaŭ okuloj, la cerbo ellaboras la ĝustan solvon: temas ne pri vera tri-dimensia figuro, sed nur du-dimensia ebena sur kiu oni izometrie pentris tri-dimensian projekcion.

Tamen se oni fermas unu okulon, la



### Barry FRIEDMAN

Barry estas esperantisto jam de preskaŭ 20 jaroj. Li ŝatas basbalon, lingvojn, kaj manĝi pasto-ringojn.

[bfriedma@chemistry.ohio-state.edu](mailto:bfriedma@chemistry.ohio-state.edu)

cerbo ne povas uzi paralakson, do ĝi atentigas nur la perspektivajn aludojn. Kaj tiuj aludoj sufiĉas por tre konvinke vidi tri-dimensie.

Pentristo kiu uzas la stereo-metodon donas al sia bildo fortajn perspektivajn aludojn. Teorie, paralakso povus liveri al la cerbo de observanto la veran (sed strangan) solvon, ke temas pri ebena asfalto kun ege neproporcia pentraĵo. Tamen la bildoj estas kutime tre grandaj, kaj oni rigardas de multmetra distanco. Pro tio la paralakso estas kutime malgranda, do la ĝusta solvo malbone rivebligas... kaj la fortega (kaj trompa) perspektiva solvo venkas. Rezulte, la spektanto havas fortan tri-dimensian percepton, kvazaŭ per nur unuokula perspektivo. ★







## NASK 2011: ne nur studado

*Raportas Ellen EDDY*

SANDIEGO, KALIFORNIO — Tri semajnoj da lernado en nur 7 tagoj! Ĉu eblas? Tio estis la defio por la 42-a NASK kiu okazis la 5-an fojon ĉe la Universitato de Kalifornio, Sandiego inter la 2-a – 10-a de Julio ĉi-somere. Tridek partoprenantoj el 10 usonaj ŝtatoj kaj 6 aliaj landoj diligente provis lerni tiom kiom eblis en tiu mallonga periodo. (La plej longan vojaĝon faris lernanto kiu venis el Kazahujo!) La kursaro aperis en mallonga formo kiel provo allogi pli da studentoj kaj malaltiĝi la kostojn por la partoprenantoj.

Klasanoj frekventis formalajn lecionojn matene kaj ne-formalajn programojn posttagmeze kaj vespere. Ili spertis diversajn grup-agadojn, prezentojn, ludojn kaj ekskursojn. Aparte interesaj estis la prezentoj pri la hejmlandoj kaj ŝtatoj de la lernantoj.

Vizitantoj Gilda Muñoz BONILLA el Meksiko kaj la nova prezidanto de Esperanto-USA Orlando RAOLA aldonis iom da ŝanĝo en la rutino per siaj prezentoj. Eĉ la kutima feria tago, la 4-a

de Julio – tago de sendependiĝo en Usono – estis studotago. Tiun tagon ĉiuj sidis en klasĉambroj en la mateno, sed sidis aŭ staris apud klifo aŭ sur alta konstruaĵo en la vespero por spekti la piroteknikaĵojn de la najbaraj urbetoj.

La plaĉa vetero de la sandiega regiono permesis vizitojn dum la semajno al la apuda plaĝo kaj aliaj vidindaĵoj en la ĉirkaŭaĵo.

La intensa studado finiĝis per festeto la lastan tagon. Krom la manĝetoj kaj trinkaĵoj aŭdiĝis muziko kaj babilado, multe da babilado. Oni povis aŭdi ke multege da lernado ja okazis dum tiu mallonga periodo. Ĉi tio rezultis dank' al la tri senlacaj instruistoj: Bertilo WENNERGREN (Svedujo/Germanujo), Birke DOCKHORN (Germanujo) kaj Lee MILLER (Usono), la helpinstruisto kaj redaktisto de la *NASKa Fasko* Hoss FIROOZANIA, Profesoro de Lingvistiko ĉe UCSD Grant GOODALL, kaj lokano Mar CARDENAS.

## Senintenca esperantaĵo?



*"Por kiam vi volas esti certa, ke via jeleo bone solidiĝas!"* Foto de Daĉjo RUTAN.

## Blankulo

Certe mi sonĝas. Antaŭ nelonge mi estis pico-bakisto. Nun mi estas instruisto de scienco. Antaŭ nelonge mi loĝis kun miaj gepatroj. Nun mi loĝas kun nur musoj kaj blatoj. Antaŭ nelonge mi estis manĝanta importitajn bananojn, rigardante programon de *National Geographic* pri afrikaj sovaĝaĵoj. Nun mi devas eviti tiujn samajn sovaĝaĵojn survoje al la banan-arbo... Mi estas Joshua kaj mi estas nova volontulo en la usona Pac-Korpuso (angle: *Peace Corps*) en Kameruno.

Mi jam estas en la lando tri monatojn. Mi ĵus finis intensan trejn-periodon, dum kiu mi lernis: kiel paroli la francan kaj *Pidgin*-on (specon de kreola angla); ke oni salutas vilaĝajn gravulojn per manklakado kaj neniam per manpremo; ke la nomo “Kameruno” venas el la portugala vorto *camarão*, kiu signifas “salikoko”; kaj ke ekzistas speco de nokta muŝo, kiu demetas siajn ovojn en malsekan teksaĵon, kaj kies larvo kreskas subhaŭte en bestoj. La leciono en tio estas: se vi lasas viajn subvestaĵojn ekstere por sekiĝi tranokte, viaj sidvangoj povas fariĝi loĝejo kaj manĝaĵo



## Joshua MORRIS

Joshua estas usona esperantisto el Vaŝingtonio. Li iam revenos tien.

[josxuo@gmail.com](mailto:josxuo@gmail.com)

por etaj vermoj. (Kaj Dio estas beninta la tropikon per multaj tiaj aferoj.)

Post trejnado, mi ĵuris subteni kaj defendi la konstitucion de Usono kontraŭ ĉiu malamiko, ĉu fremda aŭ hejma, ke dio min helpu. Tuj post kiam mi eldiris

tiujn vortojn, mi oficale iĝis volontulo de la Pac-Korpuso. La sekvan tagon mi ekvojaĝis al mia posteno, eta vilaĝo en la nord-okcidenta regiono nomata *Ewoh*. Ĝi estas kaŝita en nebulaj, ĝangalaj montetoj, kaj dum la pluvega sezono (nun) la

vojo tien estas malpli vojo ol kota rivero. Post du tagoj da serĉado, mi sukcesis dungi tri motorciklistojn por porti min kaj mian pakajaron *Ewoh*-en.

“Blankulo! Blankulo!” estis la krio kiam mi alvenis. Ŝajnas, ke la infanaro de *Ewoh* neniam ajn vidis ion pli interesan. Ili ĉirkaŭstaris kaj min rigardis. Ili nekredeleme min tuŝis, kaj kiam ili eltrovis, ke la

## Pri tiu ĉi rubriko

Ĉi-numere ni lanĉas novan serion de artikoloj danke al Joshua MORRIS, membro de Esperanto-USA ekde Januaro 2011. Ek-lerninte Esperanton pasintjare en sia hejma ŝtato de Vaŝingtonio, li nun deĵoras en Kameruno por la usona Pac-Korpuso (angle: *Peace Corps*).

Unu ĉefa celo de la Pac-Korpuso estas

helpi usonanojn pli bone kompreni alilandanojn. Por helpi plenumi tiun celon, Joshua dividos kun ni siajn ĉiutagajn travivaĵojn en lando kie la vivo estas ofte tre malsimila al la vivo de multaj usonanoj.

Jen lia unua artikolo en la serio. Joshua notas ke liaj artikoloj esprimas nur liajn proprajn opiniojn, kiuj neniel reprezentas la starpunktojn de la Pac-Korpuso.

Bonvenon, Joshua! —Red.

## Pri la lingva situacio en Kameruno

Ene de la kamerunaj landlimoj, pli ol 280 lingvoj estas parolataj. Tiu diverseco estas fonto de kaj unueco (je nivelo de tribo) kaj diseco (je nivelo de lando). Kameruno estas oficiale dulingva. Kiam la lando sendependiĝis, la kamerunanoj konservis la du lingvojn de la koloniistoj – la anglan kaj la francan – kaj nun ekzistas granda malamo inter la anglaparolantoj kaj la francparolantoj. Estas tre interese, kaj mi vidas ke Kameruno (samkiel la resto de l' mondo) profitus multe de neŭtrala, komuna lingvo. —Joshua MORRIS



Vikimedia

blankeco de mia haŭto ne forviŝiĝis, ili kelkfoje time forkuris. Sed ili neniam kuris tre for, kaj kiam ili rekuraĝiĝis, ili revenis por mankaresi miajn harojn (ĝi estas mola, kiel hundo!), rigardadi sub mia ĉemizo (ho, li estas tute blanka!), kaj elpluki vangharojn (tio al li ne plaĉas!). Mi uzis tiun tempon por iom lerni la lokan lingvon, *Mogamo*. Laŭ la infanoj, la unua frazo, kiun mi devis lerni, estas *Ma-ba-ŝa-ma-wej!* kiu signifas “Mi vin batos!” Utila diraĵo por instruisto, ĉu ne?

Nun mi aranĝadas kaj purigadas mian apartamenton. Ŝajnas ke musoj eniris post kiam la lasta okupanto foriris. Mi kuiris specialajn, venenajn kukojn por ili, do mi esperas ke, jam manĝinte mian matracon, ili restas ankoraŭ malsataj.

Mi volas fini tiun ĉi artikolon kun mallonga klarigo pri la Pac-Korpuso. La Pac-Korpuso estas organizo de ordinaraj homoj por helpi socian kaj ekonomian disvolviĝon. Ĝin subtenas la usona registaro, sed ĝi absolute ne varbas politike. Ĉiu lando, kie la Pac-Korpuso servas, invitis la Pac-Korpuson esti tie.

Nu, kial ili min sendis al mez-nenie en Afriko? Ĉar tie mi estas bezonata! La Pac-Korpuso havas tri ĉefajn celojn:

- Helpi interesatajn landojn plenumi siajn bezonojn por lertaj, kapablaj viroj kaj virinoj.
- Plibonigi la komprenon de aliaj popoloj pri usonanoj.
- Plibonigi la komprenon de usonanoj pri aliaj popoloj.

La Pac-Korpuso kredas, ke disvolviĝo devus veni de interne. Kun siaj propraj lerteco kaj rimedoj, disvolviĝantaj landoj mem povos levi sin. Ni volontuloj nur helpas komenci tion. Mi ne pavimos la kotan vojon al Ewoh, sed mi instruos matematikon al la estonta inĝeniero kiu tion faros. Lerteco, akompanata de bona internacia komprenado, helpos alilandajn homojn vidi unu la alian kiel kunulojn kaj fratojn, kaj tio helpos naciojn iĝi pli kaj pli pacemaj. Do, mi ne venis ĉi tien kun mono, kaj mi ne venis ĉi tien kiel turisto. Mi venis ĉi tien kun scio kaj kiel partoprenanto. Mi ne sendos kamerunanojn al Usono, sed mi al ili tutsame montros Usonon.

Kaj por vi, miaj samlandanoj, kaj per ĉi tiu gazeto, mi esperas iom plenumi la trian celon: montri Kamerunon al vi. ★

## N-finaĵen, ek, ek!

Ho, nia kara n-finaĵo! Kian flekseblecon ĝi donas al nia lingvo! Kian liberecon ĝi donas al niaj poetoj! Kiajn kapdolorojn ĝi donas al niaj lernantoj!

Efektive, mi opinias (ĉu hereze aŭ ne) ke la n-finaĵo ne estas la plej malfacila parto de Esperanto. Apenaŭ eblas elbuŝigi kelkajn frazojn dum ordinara konversacio sen uzi n-finaĵon, do ni almenaŭ havas abundajn okazojn ekzerci nin al tiu ero de la Esperanta gramatiko. Tamen, iafoje la decido, ĉu uzi aŭ ne uzi n-finaĵon, ja postulas iom da pensado. Ĉi-artikole, mi klarigos al vi du specojn de frazoj, en kiuj la ĝusta maniero uzi la n-finaĵon ne estas tuj evidenta.

En frazoj laŭ la modelo *Substantivo verbas substantivon kiel substantivo(n)*, tiu lasta n-finaĵo (aŭ ĝia foresto) estas tre signifoplena. Ekzemple, la signifo de *Mi amas vin kiel filo* tute malsimilas al la signifo de *Mi amas vin kiel filon*. Laŭ la unua frazo, la parolanto amas la alparolanton kiel filo amas la gepatrojn. Laŭ la dua frazo, la parolanto amas la alparolaton kiel patro aŭ patrino amas filon. Tio fariĝas pli klara se oni imagas, ke estas subkomprenata verbo kaj subjekto aŭ objekto post *kiel*. Se *filo* ne havas n-finaĵon, la frazo signifas *Mi amas vin kiel filo (amus vin)*. Tamen, se *filo* havas n-finaĵon, la frazo signifas *Mi amas vin kiel (mi amus) filon*.



**Steven CYBULSKI**

Steĉjo estas fervora gramatikemulo. Li nun loĝas en Madisono, Viskonsino.

[stcybulski@gmail.com](mailto:stcybulski@gmail.com)

**“Mi klarigos al vi du specojn de frazoj, en kiuj la ĝusta maniero uzi la n-finaĵon ne estas tuj evidenta.”**

Tute analogaj estas frazoj laŭ la modelo *Substantivo verbas substantivon pli ol substantivo(n)*. Se mi dirus, *Mi amas vin pli ol ŝi*, mi esprimus la ideon, ke mi amas vin pli ol ŝi amas vin. Se mi dirus anstataŭe *Mi amas vin pli ol ŝin*, mi esprimus la ideon, ke mi amas vin pli ol mi amas ŝin. Denove oni povas imagi, ke estas subkomprenata verbo kaj subjekto aŭ objekto en la frazo, por decidi pli facile ĉu la lasta n-finaĵo estas bezonata aŭ ne.

Ĉu vi ankoraŭ havas demandojn pri la n-finaĵo, aŭ pri iu alia malfacilaĵo de Esperanto? Bonvolu ne heziti sendi ilin al mi! Mi ĉiam tre ĝojas ricevi mesaĝojn de legantoj. ★

### Verku por Usona Esperantisto!

Ni daŭre serĉas kontribuantojn kiuj preta verki regulajn rubrikojn, aŭ ses- aŭ trifojojn jare. Se vi volus kontribui, proponu vin kaj vian ideon al la redakcio, ĉe:

[bulteno@esperanto-usa.org](mailto:bulteno@esperanto-usa.org)



# False friends

Probably the most time-consuming part of studying any language is developing a vocabulary, so it's always a relief to encounter a familiar word, either from one's native language or from another language one has already learned. Even if the foreign word is spelled or pronounced differently, or the word it looks like is relatively uncommon (*vespero* and "vespers," for example), it can be a big help.

But not every word that looks familiar is all that close in meaning. If you mistakenly suppose the Spanish word *embarazada* to mean "embarrassed," that's what you'll probably be when you find out it actually means "pregnant." If you ask for advice on buying *ein Gift* in a German store you're apt to be looked at suspiciously, since that's the German word for "poison." On the other hand, in French *un poisson* is "a fish."

In language teaching it's traditional to call these tricky words "false friends," because when we see or hear one we happily think we're encountering an old acquaintance in an unexpected place. (I've been told that I slightly resemble Paul Gubbins, the screenwriter of the *Pasporto* course. Once the great Esperanto poet Marjorie Boulton, a friend of his, once looked quite happy to see me at a *Universala Kongreso*. On getting close enough to get a better look, she said she'd mistaken me for someone else and headed in a more promising direction.)

We sometimes even invent a false friend on the fly in speaking or writing, for example adding an *-o* to an English



**D. Gary GRADY**

Gary is Vice President of the American Association of Teachers of Esperanto (AATE). He lives in Durham, NC.

[dgarygrady@frontier.com](mailto:dgarygrady@frontier.com)

noun in the optimistic hope it will prove to be valid Esperanto. Sometimes this works, sometimes the result isn't Esperanto, and sometimes, unfortunately, it is Esperanto but means something that in context can range from slightly off to incoherent to horrifically embarrassing. I regret to say I know about the last from personal experience, though I'll avoid being specific.

Something that isn't exactly a false friend but is at least a closely related source of trouble is translating an expression word-for-word from one language into another. In one of his books (*Anguished English*, if I recall correctly), Richard Lederer described trying to buy a hot dog from a street vendor in Germany and provoking a good deal of hilarity by ordering a *heiβes Hund* – literally a "hot dog" in the sense of a dog that's hot, which is not quite what he meant. The actual German expression is, I believe, a true friend for English speakers: *ein Hot Dog*.

Incidentally, there are some more-or-less parallel pitfalls in grammar as well, though I'm not aware of a name for them. One example is translating "I'm going to the party tomorrow" as *Mi iras al la festeto morgaŭ*. This seems natural to English speakers because in English we often use the present tense to indicate a current



intent with respect to a future action. Esperanto, however, is more logical and uses the future tense to refer to future actions—*mi iros* in this case.

Unfortunately, we don't often stop to think about the exact meaning of the grammar we use. Teachers of Esperanto should make a point of specifically warning students about such common mistakes, since otherwise they're apt to become engrained habits. The same applies to false friends, especially the more subtle ones. If the difference in meaning is large enough—say, using the word *muso* (“mouse”) for a “moose”—the resulting confusion is likely to make the speaker aware of the mistake.

But often the meanings are close enough that the difference is in practice subtle and the error not at all obvious. In fact, the speaker may accidentally say something that makes sense, even if it doesn't convey the intended meaning. Of course, if both the speaker and the listeners are native English speakers who share the same misapprehension about the the word in question, there won't even be a miscommunication.

To take one such subtle example that's in practice a very common mistake, the Esperanto equivalent of the English word “type”—in the sense of a classification, as

in a “type of vehicle”—is not *tipo*, but *speco*.

In Esperanto, a *tipo* is a “model” or a “characteristic or ideal example.” To quote the *Reta Vortaro* (which you can find at <<http://reta-vortaro.de>>), *tipo* means:

*1. Ideala modelo prezentanta altgrade en si la karakterajn ecojn de iu speco da personoj aŭ objektoj ... 2. Modela peco laŭ kiu oni fabrikas similajn pecojn; speciale la plumbaj prestipoj kiajn oni iam uzis en presado.*”

## False friends?



At left, author D. Gary Grady. At right, British Esperantist Paul Gubbins, with whom Gary is sometimes confused.

In other words, a *tipo* is, sensibly enough, something that's *tipa*.

To confuse things a little further, the English word “type” does sometimes have the Esperanto meaning, as for example in the root of the word “archetype.” Similarly,

*argumento* is equivalent to one sense of the cognate English word (in that of a logical “argument” in favor of some point), but *argumento* does not mean “dispute.” Likewise *adulta* means (and looks a little like) “adulterous,” but is dangerously similar to “adult.” (Watch how you praise someone for acting grown up!)

Other fairly common false friends include *aktuala* (“current, topical”), *akurata* (“prompt, punctual”), *balanci* (“to rock or swing”), *demandi* (“to ask,” not *postuli*),

*oportuno* (something convenient; “opportunity” is usually best translated *okazo*), *frazo* (“sentence”), *novelo* (“short story”), *pretendi* (“to claim,” not *ŝajnigi* or *preteksti*), *kuraci* (“to treat medically”, “to cure” is *resanigi*), *sorto* (“fate”, not “sort” or “type,” that again is *speco*), *kontroli* (“to check or monitor”; “to control” is *regi*), and, of course, *farti*, possibly the favorite verb in Esperanto of 12-year-old English-speakers. (One suspects the expression *mi petas* is similarly popular among the 12-year-olds of France.)

A useful practice for anyone using Esperanto (or for that matter their native tongue) is to get into the habit of occasionally looking words up in a dictionary. When reading a magazine article I’ll sometimes (probably not as often as I should) underline a word or otherwise make note of it, then in some odd moment look it up to see if it really does mean what I think it does.

You can find a number of useful lists of Esperanto false friends online, including this one from the Esperanto Association of Ireland:

<[http://www.esperanto.ie/english/language/falsefriends\\_1.html](http://www.esperanto.ie/english/language/falsefriends_1.html)>

Many times a false friend in Esperanto appears in other languages as well, usually with a meaning closer to that of Esperanto. For example, the German *aktuell* and the French *actuel* mean essentially the same as the Esperanto *aktuala*, but not the English *actual*. This is another way in which learning Esperanto helps students when they study other languages, both by making them conscious of the existence of false friends and by introducing them to words with cognates in other major European languages.

But note that speakers of other languages do encounter false friends in Esperanto. Here is a page listing examples in several languages:

<[http://en.wikibooks.org/wiki/Esperanto/Appendix/False\\_friends](http://en.wikibooks.org/wiki/Esperanto/Appendix/False_friends)> ★

[A great list of “false friends” and other troublesome words from David Jordan’s *Being Colloquial in Esperanto is now available for free online*, at

<<http://weber.ucsd.edu/~dkjordan/eo/colloq/colloq190.html>> —Ed.]

## Solvo de la enigmo en n-ro 2011:3

Gratulon al **Olga DU TEMPLE**, la ĉi-numera gajninto! Laŭrojn al ankaŭ solvintoj Shāri WEBBER-DUNN, William PECKENPAUGH, Arlyn KERR, Peter MCCORQUODALE, Cornelius J. MCKOWN, Briĉjo, Vilĉjo HARMON, Russ WILLIAMS, Daĉjo RUTAN, Anna BENNETT kaj Walter MURAWSKI.

La krucvortoenigmo nun ferias por ĝui la lastajn tagojn de somero; ĝi baldaŭ revenos. Intertempe, sur la dorsa kovrilo aperas logik-enigmo de legantoj Anna SKUDLARSKA kaj Russ WILLIAMS.


**Bonvolu ne sendi solvon al la redaktisto, ĉar ankaŭ la premio ferias ĉi-numere...**

K	O	M		G	L	A	N	O		K	T	P
I	N	A		L	A	G	O	N		V	E	R
S	I	D	L	O	K	O		I	M	A	M	O
			R	E	S	T		F	L	A	N	
S	L	I	P		O	R	O	E	S	T	A	S
K	U	D	R	I		O	R	K	O		G	E
A	M	O		D	A	N	K	A		A	L	K
N	I		M	E	R	D		S	A	L	O	S
I	S	L	A	N	D	A	N		B	O	N	O
			O	R	T	A		I	R	A	K	
F	E	N	D	I		F	L	A	T	U	L	A
I	N	G		G	A	L	O	N		L	U	D
D	U	A		I	N	U	N	D		O	N	E

# New in the E-USA bookstore



**ESPERANTA  
VERSADO**  
**Jaroslav KROLUPPER**  
Sonetoj, rondeloj, pantu-  
noj, rispetoj, tercinoj kaj  
aliaj rimaĵoj. Mola bindaĵo.  
54 p. 2011. Ĉehuĵo. **\$7.70**



**IZOLO**  
**Kálmán KALOCSAY**  
La tria poemaro de la  
granda aŭtoro. Malmola  
bindaĵo. 77 p. 1977. Neder-  
lando. **\$10.50**



**MONDO KAJ KORO**  
**Kálmán KALOCSAY**  
La unua originala kolekto de  
la ĉefa intermilita E-poeto.  
32 p. 1981. Germanuĵo.  
**\$11.10**

Order from **Esperanto-USA, PO Box 1129,  
El Cerrito CA 94530**, or online at  
<<http://esperanto-usa.org/retbutiko>>.  
More complete descriptions can be found  
online. If a title is out of stock, the online  
bookstore can notify you by email when it  
becomes available again. Thanks largely to  
fluctuations in the value of the dollar, all  
prices are subject to change without notice.

## enigma

Antaŭ NASK instruisto petis ke lernantoj kunportu kun si esperantajn librojn, kiujn ili ege ŝatas, kaj ke ili legu almenaŭ parton de ili. Ĉiu lernanto kunportis malsaman libron, kaj ĉiu lernanto legis malsaman elcenton de ĝia enhavo. Eltrovu: kiu kunportis kiun libron kaj kiom multe de ĝi ŝ/li legis.

	Komencis legi	Legis 40%	Legis 80%	Finis libron	Morto de Artisto	Bona Lingvo	Fajron mi sentas interne	Ŝtona urbo
Tomio								
Petra								
Daniela								
Andrea								
Morto de Artisto					<ol style="list-style-type: none"> <li>1. Persono kiu legis 80% de sia libro kunportis la libron <i>Fajron mi sentas interne</i>.</li> <li>2. Andrea ne kunportis la libron <i>Morto de artisto</i>.</li> <li>3. Tomio nek legis precize 40%, nek finis sian libron.</li> <li>4. Persono, kiu finis libron, ne estas Petra.</li> <li>5. Ambaŭ Petra kaj Daniela kunportis librojn verkitajn de viroj, sed Petra legis pli grandan parton de sia libro ol Daniela.</li> </ol>			
Bona lingvo								
Fajron mi sentas interne								
Ŝtona urbo								